



IRANA ESPERANTISTO

IREA
Irana Esperanto-Asocio

پایه سبز اندیشان

Kultura sezon-revuo en la persa kaj Esperanto
N-ro: 31, Dua Serio, Aŭtuno 2019

فصلنامه‌ی فرهنگی دوزبانه‌ی فارسی و اسپرانتو
شماره ۳۱، دوره دوم، پاییز ۱۳۹۸



انگلیسی، چرا نه!

شرح تصویر: دوره‌های متعدد آشنایی با اسپرانتو در رشت به همت آقای اکبر صداقت



Pajam-e Sabzandiŝan
(Mesaĝo de Verd-ideanoj)
ISSN 1728-6174

IRANA ESPERANTISTO
Kultura kaj sendependa sezon-revuo internacia
Dua serio, N-ro 31, Aŭtuno 2019

Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj kontribuaj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj antaŭe. Bonvenas kultur-temaj kontribuaj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj antaŭe. Bonvenas kultur-temaj kontribuaj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj antaŭe.

Ĉia presa aŭ elektronika citado aŭ eldonado de materialoj de IRANA ESPERANTISTO, ĉu originale ĉu tradukite en aliajn lingvojn, estas permesata. Bonvole menciu pri la fonto kaj la originala lingvo (t.e. Esperanto aŭ la persa) kaj se eble, informu nin pri eldonaĵo en kiu aperis io de aŭ pri IRANA ESPERANTISTO aŭ/kaj sendu ciferecan kopion al ni.

به نام خداوند جان و خرد



فصل‌نامه‌ی پژوهشی - فرهنگی دوزبانه‌ی فارسی و اسپرانتو

دوره دوم، شماره سی‌ویکم، پاییز ۱۳۹۸
شماره استاندارد بین‌المللی (ISSN):
۱۷۲۸-۶۱۷۴

تاریخ انتشار نخستین شماره: پاییز ۱۳۸۱

نقل مطالب مجله با ذکر منبع و ماخذ جایز است و از استفاده کنندگان درخواست می‌شود یک نسخه الکترونیکی یا تصویر از نشریه‌ای را که در آن مطلبی به نقل از این مجله درج شده است به نشانی اینترنتی مجله ارسال کنند.

مسئولیت مطالب مندرج در این مجله برعهده‌ی نویسندگان آن می‌باشد.

گرافیک و حروفچینی: سبزاندیشان

نشانی‌ها:

پایگاه اینترنتی: www.espero.ir

پست الکترونیک: info@espero.ir

همکاران تحریریه این شماره:

- * علی مرادی
- * علی اصغر کوثری
- * احمدرضا ممدوحی
- * اکبر صداقت
- * سیمین عمرانی
- * امیر فکری
- * شلر کریمی
- * منیره فهمی
- * نازی صولت
- * حمزه شفیع

Mallongigoj uzitaj en ĉi tiu numero

ILEK: Irana Literatura Esperanto Konkurso
 IREA: Irana Esperanto-Asocio
 IREJO: Irana Esperantista Junulara Organizo
 IREK: Irana Esperanto-Kongreso
 IRLEI: Irana Ligo de Esperantistaj Instruistoj
 UK: Universala Kongreso

Irana Esperantisto
akceptas anoncojn.

مجله سبزاندیشان آماده پذیرش آگهی می‌باشد.

Kontribuantoj ĉi-numere:

- * Simin Emrani
- * Amir Fekri
- * Ahmad Reza Mamduhi
- * Ali Moradi
- * Akbar Sedaghat
- * Ali Asgar Kousari
- * Shler Karimi
- * Monire Fahmi
- * Nazi Solat
- * Hamzeh Shafiee



Kovrila Paĝo:
Seminarioj pri Esperanto en Raŝt-urbo
Lasta Paĝo:
Zamenhof-Tago

طرح روی جلد:
دوره‌های آشنایی با اسپرانتو در رشت
 طرح پشت جلد:
روز زامنهوف



En ĉi tiu numero:

در این شماره:

Paĝo

صفحه

- 4 Antaŭ ĉio..
- 5 UEA Mesaĝo por Z-tago
- 6 Novaĵoj
- 7 Pri Zamnenhof-tago
- 8 La angla, kial ne!
Prelego de inĝ. Ahmad Reza Mamduhi
- 19 Pri la 7-a Irana E-Kongreso
- 20 Diversaĵoj
Amir Fekri
- 22 EU subtenas Esperanton
Tradukis: Ŝler Karimi
- 24 Aventuroj de Pioniro
Tradukis al la persa: A. Fekri
- 26 Nora
Tradukis al la persa: A. Fekri
- 28 Ĉiuj penoj por aĉeti vortaro
Intervjuo kun Ali Asgar Kousari
- 30 Leviĝo
Tradukis: M. Fahmi
- 30 Renkontoj kun Diferenculoj en Kurda
Ŝler Karimi
- 31 Esperanto en unu rigardo
Esperantigis: Ali Moradi



- قبل از هر چیز ... 4
- پیام UEA به مناسبت روز زامنهوف 5
- اخبار 6
- درباره روز زامنهوف 7
- انگلیسی، چرا نه!
متن سخنرانی مهندس احمدرضا ممدوحی 8
- درباره هفتمین کنگره اسپرانتوی ایران 19
- گوناگون
امیر فکری 20
- حمایت اتحادیه اروپا از اسپرانتو
ترجمه توسط شلر کریمی 22
- ماجراهای یک پیشتاز (قسمت ۸)
ترجمه توسط امیر فکری 24
- نورا (داستان کوتاه)
ترجمه توسط امیر فکری 26
- همه مشقات خرید یک فرهنگ لغت
گفت‌وگو با علی اصغر کوسری 28
- ترجمه شعر
منیره فهمی 30
- کتاب کامیلا و آدمهای متفاوت به زبان کردی
شلر کریمی 30
- اسپرانتو در یک نگاه
ترجمه: علی مرادی 31

Antaŭ ĉio...

Lastatempe en Irano, denove ni aŭdas multon pri la neceso de forigi la anglan lingvon el la lernejoj edukad-sistemo. Eĉ oni proponas anstataŭigon de ĉina aŭ rusa lingvoj en la lernejoj. Estas ankaŭ multaj kontraŭstaraj esprimoj pri tiuj ĉi proponoj. Ŝajnas ke la registaro kaj la edukad-sistemo sentas danĝeron pri la hegemonio de angla lingvo kaj intencas iel rompi regadon de la angla lingvo en lernejoj.

Rilate al tiu ĉi grava afero, inĝ. Mamduhi prezentis du prelegojn en kadre de Monataj Prelegoj de Irana Esperanto-Asocio. Interesa estis la titolon elektita de li por tiuj du prelegoj. La unua prelego, "La angla, kial ne!", estis prezentita en la 14-a datreveno de Monataj Prelegoj de IREA kaj vaste kaptis atenton en interreto kaj sociaj ret-grupoj. La dua prelego, "Esperanto, kial jes!" estis prezentita en la fest-programo de Zamenhofa tago en IREA-oficejo. Por tiu ĉi numero de la revuo, ni publikigas la tekston de la unua prelego. Ni intencas aperigi la tekston de la dua prelego en la venonta numero. Ne perdu la legadon de ambaŭ prelegoj.

Via, Hamzeh Shafiee

قبل از هر چیز...

اخيراً در پی مطرح شدن حذف آموزش زبان انگلیسی یا حذف آموزش انحصاری آن در ایران، صحبت‌ها و پیشنهادهای شده، که بحث‌های فراوانی را ایجاد نموده است، از جمله این که:

- این کار نباید انجام شود، زیرا انگلیسی زبان علم است و بدون آن نمی‌توان پیشرفت کرد.
- در خطه‌ی شمال کشور باید روسی جایگزین انگلیسی شود چون همسایه‌ی ما در آنجا روسیه است.
- باید به جای انگلیسی، زبان چینی را بیاموزیم، چراکه چین تبدیل به یک ابرقدرت شده است یا به زودی خواهد شد.
- باید آموزش عربی و ترکی را در اولویت قرار دهیم چون اکثر فرهیختگان جهان یا عرب یا ترک هستند.
- و ... و ... و ...

با توجه به این موضوع، در فصل پاییز امسال دو سخنرانی مرتبط با هم توسط مهندس ممدوحی در دفتر انجمن اسپرانتو برگزار شد که بسیار مورد توجه قرار گرفت و بازتاب گسترده‌ای در شبکه‌های اجتماعی یافت. نخستین سخنرانی با عنوان "زبان انگلیسی، چرا نه!" همزمان با چهاردهمین سالگرد برگزاری جلسات سخنرانی ماهانه در تاریخ هفتم مهرماه، و دومین سخنرانی با عنوان "زبان اسپرانتو، چرا آری!" همزمان با جشن روز زامنهوف در تاریخ ۲۴ آذرماه امسال ارائه گردیدند. نظر به اهمیت موضوع و محتوای ارزشمند این دو سخنرانی، متن آنها به ترتیب ارائه در این شماره و شماره بعدی مجله برای علاقه‌مندان درج می‌گردد. خواندن این دو مقاله را از دست ندهید.

ارادتمند، حمزه شفیعی





تهنیت سازمان جهانی اسپرانتو به مناسبت یکصد

و شصتمین

سالگرد زادروز دکتر لودویک زامنهوف و دعوت به گرامیداشت آن

آیا ما باید این وضعیت را بپذیریم؟ آیا ما باید فکر کنیم، که با وجود تلفن‌های هوشمند عصری جدید، تمدنی جدید و دنیای جدیدی آغاز شده است؟

خیر، ما مجبور نیستیم و نمی‌توانیم، و باید در جستجوی متحدین و متفقین دیگری برای بهتر کردن دنیا در عرصه صلح، اقتصاد، فرهنگ و سعادت انسانی به شکل واقعی باشیم.

اگر به پیرامون خود بنگریم، فقط سازمان ملل متحد - برای مثال با اهداف ۱۷ گانه خود در حوزه توسعه پایدار - به گونه‌ای میل به انجام آن دارد. این سازمان که امسال هفتاد و پنجمین سالگرد خود را جشن می‌گیرد، اگر در دام فرمانروایانی که در کلام اهداف را تمجید نموده ولی در عمل از انجام آنها ممانعت می‌ورزند باقی بماند هیچگاه به آن اهداف دست نخواهد یافت. اتکا کردن بر چند تن از فرمانروایان دنیا که میل بسیار به ترقی و تحول دارند و آن دسته از انسانهایی که خواهان صلح، پیشرفت و خوشبختی هستند امری ضروری خواهد بود.

اکنون زمان آن فرا رسیده است که سازمان ملل متحد به ایده‌های لودویک لازارو زامنهوف گوش فرا دهد. آن ایده‌ها امروزه بیش از پیش مهم هستند. UEA، سازمان جهانی سخنگویان اسپرانتو، نه چندان اتفاقی موضوع کنگره ۲۰۲۰ در مونترال کانادا را به این امر اختصاص داده است: "سازمان ملل ۷۵ ساله: گفتگو و تفاهم در جهان متحول".

روز زامنهوف را جشن بگیرید و سپس از آموزه‌ها و تجارب UEA که در راستای بهتر ساختن جهان توسط نهضت اسپرانتو و سازمان ملل است حمایت کنید.

رناتو کورستی

کارگروه اطلاع‌رسانی سازمان جهانی اسپرانتو

ترجمه از اسپرانتو به فارسی: سیمین عمرانی

لودویک لازارو زامنهوف ۱۶۰ سال قبل متولد شد. او زبان جهانی اسپرانتو را نه به خاطر علاقه به زبان‌ها، بلکه به دلیل تمایل و توجهش به صلح ابداع نمود. صلح هم می‌تواند وجود داشته باشد و هم پایدار بماند اگر بر پایه عدالت و برابری میان انسانها، گروه‌های انسانی و مردم باشد. بر اساس این ارزش‌ها بود که زبان بین‌المللی اسپرانتو توانست یکی از خونین‌ترین سده‌های تاریخ بشر یعنی قرن بیستم را از سر بگذراند، و هنوز نیز برای تعمیم آن ارزش‌ها تلاش و تقلا می‌کند.

در حقیقت جهان در ۱۶۰ سال اخیر به شکل بنیادین تغییری نکرده است. شتابزدگی و الزام به زور، میل به حکمرانی بر سایر مردمان و خیانت به گروه خود به منظور کسب امتیازات توسط حکمرانان از مسائل بسیار امروزی است که متأسفانه غالباً در شکل جنگ و کشتار انبوه انسانها یا اعمال تحریم‌های اقتصادی، به عبارت دیگر تحمیل ممنوعیت اقتصادی بر کشورهای طرف درگیر خود را نشان می‌دهد. ادیان که زامنهوف از آن‌ها در تمام طول زندگی خود مدد می‌جست، اکنون خود وسیله‌ای برای جدایی و ایجاد جنگ و نزاع میان ابناء بشر شده است.



دکتر لودویک لازاروس زامنهوف - آفریننده زبان بین‌المللی اسپرانتو

اخبار کوتاه

یکصد و پنجمین همایش جهانی اسپرانتو



یکصد و پنجمین همایش جهانی اسپرانتو، از ۱ تا ۸ آگوست ۲۰۲۰ میلادی (۱۱ تا ۱۸ مرداد ۱۳۹۹ شمسی) در شهر مونترآل کانادا، با این موضوع برگزار خواهد شد: "سازمان ملل در ۷۵ سالگی: گفتگو و تفاهم در دنیای در حال تغییر". هدف از انتخاب این موضوع برجسته نمودن و تاکید بر سهم سازمان ملل در صلح و توسعه از زمان تأسیس آن است. جهت کسب اطلاعات بیشتر و ثبت‌نام برای شرکت در کنگره به آدرس زیر مراجعه نمایید:
<https://uea.org/kongreso>

سیزدهمین کنگره اسپرانتوی خاورمیانه و شمال آفریقا



سیزدهمین کنگره اسپرانتوی خاورمیانه و شمال آفریقا از ۲۷ تا ۳۰ مارس ۲۰۲۰ (۸ الی ۱۱ فروردین ۱۳۹۹) در شهر توریستی چشمه واقع در ساحل دریای مدیترانه و با فاصله ۸۵ کیلومتری از ازمیر در جمهوری ترکیه برگزار خواهد شد. اطلاعات کامل درباره این کنگره و نحوه ثبت‌نام را در آدرس اینترنتی زیر بیابید:

https://uea.org/vikio/La_dek-tria_Mezorienta_Kunveno_en_Turkujo

پشتیبان همیشگی، عضو افتخاری انجمن اسپرانتوی ایران

خانم حشمت فرجی از دیرباز به عنوان یکی از پشتیبانان و همراهان موثر در پیشبرد حرکت اسپرانتو در ایران شناخته شده‌اند. ایشان که از سال‌ها قبل در خارج از کشور زندگی می‌کنند، همواره از دور جویای احوالات اسپرانتودانان کشورمان بوده و



کمک‌های مادی و معنوی خود را به هر طریق ممکن برای اعتلای اسپرانتو اختصاص می‌دهند. در سال ۲۰۰۷ اعضای کمیته وقت تصمیم گرفتند ایشان را به عنوان عضو افتخاری انجمن معرفی نمایند و در سال جاری اعضای کمیته فعلی انجمن به اتفاق آرا عضویت افتخاری دائمی ایشان را تصویب نمودند.

خانم فرجی در سفری که پاییز امسال به ایران داشتند، حق برداشت از مستمری ماهانه خود را سخاوتمندانه به انجمن اسپرانتوی ایران واگذار نمودند.

منتشر شد: اسپرانتو با روش مستقیم



"اسپرانتو با روش مستقیم" کتاب آموزش زبان اسپرانتو تالیف استانو مارچک که تاکنون به ۴۳ زبان ترجمه شده است هم اینک به زبان فارسی نیز در دسترس علاقه‌مندان و زبان‌آموزان است. این کتاب توسط آقای سعید بلوچی ترجمه و با همکاری انجمن اسپرانتو ایران به چاپ رسیده است.

روز زامنهوف



روز زامنهوف یا زامنهوف تاگو (به اسپرانتو: Zamenhofa Tago) برابر با ۱۵ دسامبر مصادف با زادروز لودویگ زامنهوف، خالق زبان اسپرانتو می‌باشد. از این روز با عناوین "روز اسپرانتو" و "روز کتاب اسپرانتو" نیز یاد می‌شود. همه‌ساله اسپرانتیست‌های سرتاسر جهان با برگزاری مراسم روز زامنهوف، به پاسداشت تلاش‌های وی در جهت خلق زبانی بی‌طرف به منظور کاربرد در ابعاد بین‌المللی می‌پردازند. در فرهنگ اسپرانتو، این روز بیشترین مناسبتی است که مورد توجه واقع می‌شود.

در کشور ما نیز هر ساله همزمان با سراسر جهان، برنامه‌های گردهمایی و گرامی‌داشت این روز برگزار می‌شود. تصاویری که در این صفحه ملاحظه می‌کنید، عکس‌های یادگاری برگزاری مراسم روز زامنهوف در سال‌های اخیر هستند.



سال ۱۳۹۳



سال ۱۳۹۲



سال ۱۳۹۱

پانزدهم دسامبر، زادروز لودویگ لازارو زامنهوف (۱۹۱۷-۱۸۵۹)، مبتکر زبان بین‌المللی اسپرانتو می‌باشد. بنابر پیشنهاد یکی از نویسندگان معروف مجارستانی به نام یولیو باگی (۱۹۶۷-۱۸۹۱) که اسپرانتودان هم بود، گویشگران این زبان در سراسر جهان، این روز را به عنوان روز "فرهنگ اسپرانتو" نیز جشن می‌گیرند. باگی پیشنهاد کرد با هدف بالا بردن سطح فرهنگ اسپرانتودانان، روز زامنهوف، روز "کتاب اسپرانتو" هم باشد.

در این روز، گروه‌های محلی اسپرانتودان کشورهای مختلف، برنامه‌های فرهنگی ترتیب می‌دهند تا در مورد زبان بین‌المللی و فرهنگ غنی آن، چه به صورت ترجمه و چه به صورت نگارش به زبان اصلی، به عموم مردم، آگاهی‌رسانی کنند. به این ترتیب، به جهان نشان می‌دهند که چگونه اسپرانتو به گسترش فرهنگ نوشتاری گروه‌ها و قبایل مختلف، کمک می‌کند و به گویشگران سایر زبان‌ها نیز امکان را می‌دهد تا از راه انتقال تنوع زبانی، از نوشته‌های دیگر مردمان استفاده کنند و لذت ببرند. این یعنی حمایت از عدالت، حق برابر در ارتباطات، احترام به تنوع فرهنگی و زبانی، و تلاش در جهت حفظ پایدار غنا و حقوق آن. در کنار برگزاری گردهمایی، نمایشگاه و سخنرانی در مورد مبتکر زبان بین‌المللی اسپرانتو، یعنی زامنهوف، در این روز ادبیات اسپرانتو نیز از راه معرفی انتشارات جدید، همچنین فروش و خواندن کتاب‌های جدید، جشن گرفته می‌شود.



سال ۱۳۹۶

نوشته‌هایی به زبان‌های مختلف وجود دارند که از زبان اصلی اسپرانتو ترجمه شده‌اند. برخی دیگر به زبان‌های محلی به چاپ رسیده‌اند که ترجمه شده از نسخه اسپرانتو بوده ولی نسخه اسپرانتو نیز ترجمه شده از زبان دیگری بوده است؛ زبان اسپرانتو به عنوان پل زبانی دقیق بین دو زبان قومی، عمل می‌کند و دسترسی به مطمئن‌ترین متن ترجمه را امکان‌پذیر می‌سازد.

ترجمه از اسپرانتو به فارسی: نازی صولت



سال ۱۳۹۷



**Monataj
Prelegoj**
Gratulon pro
la 14-jariĝo!



D-ro Kejhan Sajjadpur, la iniciatinto kaj organizanto de Monataj Prelegoj de Irana Esperanto-Asocio. Nun li, i.a. kun helpo de internacia grupo el kompetentaj samideanoj estas fintradukanta la ĉefverkon de Sadio (1184—1281), *La Florejo*, en Esperanton.



La Angla, Kial Ne!

Prelego de Ahmad Reza Mamduhi

*Okaze de la 14-jariĝo de la Monataj Prelegoj de IREA,
organizitaj de d-ro Keyhan Sayadpour*

La 29an de Sep. 2019, En la oficejo de Irana Esperanto-Asocio, Tehrano



Dediĉita al:

• Ĉiuj, kiuj batale verkas kontraŭ la angla - kiel la internacia lingvo - precipe vere admirindaj anglalingvanoj, kiel:

- D-ro Robert Phillipson
- D-ro Humphrey Tonkin
- D-ro Mark Fettes
- S-ro David Curtis
- ...



Strukturo de tiu ĉi prezentaĵo:

- Enkonduko: Kun kia aŭ kiu-rola angla oni kontraŭas?
- Kial la angla ne estas taŭga por roli kiel la monda lingvo?
 - Ĝi estas la lingvo de brita kaj usona imperialismo
 - *Post Lingva Imperialismo, diversspecaj imperialismoj fereblas multe pli facile*
 - Ĝi estas diskriminacia, ekz-e en labor-merkato
 - Ĝi estas nestabila kaj jam ekzistas multaj anglaj kiel Singlish, Taglish, ...
 - Ĝi estas malfacile lernebla
 - *Skribade (alfabeto), Legade (fonetiko), vorte (leksiko) kaj regule (gramatiko)*
- Konkludo


Enkonduko: Kun kia aŭ kiu-rola angla oni kontraŭas?

kiu-rola angla?

• Ja nek mi nek iu ajn alia persono estas kontraŭ la angla lingvo – aŭ kontraŭ kiu ajn alia nacia lingvo – ĝis kiam temas pri naci-skala lingvo kun naciskalaj servoj kaj roloj.

• Fakte mi estas inter la ŝatantoj de la angla lingvo, kaj eble estas la nura iranano, kiu havigis al si la atestilon pri sukcesa ekzameno de la Internacia Fonetika Alfabeto (IFA) de la angla el la Universitata Kolegio Londona, kiam s-ano d-ro John C. Wells estris tie la Fonetikan Departamenton.

Tamen ekkiam ĉiu ajn lingvo – kiel la greka, latina, araba, franca kaj nun ĉefe la angla – komencas roli kiel internacia lingvo kun probablaj imperialismaj celoj, la afero tute aliĝas kaj batalado kontraŭ la lingvo fariĝas tute pravigebla, kaj eĉ enda.



Mi eble batalas kontraŭ la brita registaro, sed mi ne malamas la anglojn aŭ ilian lingvon. Fakte, mi aprezas iliajn literaturajn trezorojn. - Mahatma Gandhi -

En Irano – kaj probable ankaŭ en multaj aliaj neanglalingvaj landoj de la mondo, kie oni iel devigis la popolojn lerni la anglan – de tempo al tempo iu diras ion kontraŭ la instruado de la angla, aŭ pro la senrezulta konsumado de troaj tempo kaj mono, aŭ pro imperialistaj induktoj farataj pere ĝi, sed la efemera reago flanke de aliaj tiulande estas nur proponoj kiel:

– Eklerni la rusan, ĉinan aŭ alian nacian lingvon (de superpotenco nuna aŭ baldaŭ!) anstataŭ aŭ kune kun la angla



– Internaciigi nacian lingvon de ni mem – irana-kaze la persan!



Senrezultaj plendoj!

• Alivorte:

– De tempo al tempo eldiriĝas plendoj – ĉu etaj, ĉu egaj; far ĉu simplaj civitanoj, ĉu famaj personoj aŭ/kaj regantoj de la landoj, tamen aŭ nenio okazas poste, aŭ oni proponas misvojojn al aliaj naciaj lingvoj!




Postkoloniaj gvidantoj – Kiel d-ro Robert Phillipson diras en sia artikolo “La Politiko de instuado de la Angla Lingvo” en “Enciklopedio pri Lingvo kaj Edukado” la fakto estas tio, ke: Post-koloniaj gvidantoj de liberigitaj landoj daŭrigas la utiligadon de la angla, kaj tial iliaj landoj restas forte dependantaj al siaj ekskoloniantoj.¹



La optimuma solvo

• Sed kiel ni esperantistoj bone scias, la optimuma solvo ja estas nia sukcesa lingvo Esperanto



• Tamen ni bezonas atingigi nian ideon kaj voĉon al la oreloj de la ekstera publiko

• Kiam temiĝas tiaj kontraŭ-anglaj paroloj, ni ekhavas oran okazon por prezenti nian ideon

• Probable la plej bona vojo estas tio, ke unue ni elradikigu la anglan kiel la internacian lingvon

• Por tion fari ni bezonas prezenti ĉiujn negativajojn de la angla por roli tia-pozicie, en diversaj terenoj kiel politiko, ekonomio, sociologio, edukado,

• La nuna prelegeto – kio estas surbaze de parto de verkata libro nun perslingva (eble titolota: “La Angla aŭ Esperanto?”) – estas paŝeto tiu-flanken.



1 - Robert Phillipson, The Politics of English Language Teaching, en: Ruth Wodak and David Coson (editors), Encyclopedia of Language and Education, vol. 1: Language Policy and Political Issues in Education, Springer, 1997, 266 pp., pp. 13-22.

Kial la angla ne estas taŭga por roli kiel la monda lingvo?

1- La angla estas la lingvo de brita kaj usona imperialismo

Justo kaj Maljusto Lingvo-terene

عدل چه بود؟ وضع اندر موضعش

ظلم چه بود؟ وضع در ناموقعش

مولانا: مثنوی معنوی، دفتر ششم



Kioas* justo? Estado de objekto en loko ĝia!

Kioas maljusto? Estado de objekt' ekster lok' ĝia!

Rumi (1207-1273), la plej granda miŝtika poeto de la persa

Nun la angla maljuste okupas la lokon de Esperanto

La angla: “La vera nigra oro de Britio”

Ĝenerala direktoro de la Brita Konsilio: “*La vera nigra oro de Britio ne estas NordMara nafto, sed estas la angla lingvo.*”²



long-term ideological objectives. In the 1980s, for instance, the head of the British Council, the UK's central promoter of English as a foreign language, maintained that 'Britain's real black gold is not North Sea Oil but the English language' (quoted in Phillipson 1992: 48-49). Anglo-American linguistic impe-



Kio estas la Brita Konsilio?

Unue ni vidu kion malkaŝas s-ano David Curtis en “Eŭropa Bulteno” rilate al komenciĝo

² British Council, Annual Report 1987/88, p. 8., Citita en: Robert Phillipson: “Linguistic Imperialism”, Oxford University Press, 1992, 365 pp., pp. 48-49.

* **Parenteze pri “Kioas”** D-ro Humphry Tonkin en sia kontribuajo kun la titolo “La Semantiko de Invento: Tradukado al Esperanto” al la libro “La Tradukisto kiel Peranto de Kulturoj”, kies redaktoro ankaŭ estas li mem kune kun Maria Esposito Frank, post rakontado de detalaĵoj pri siaj tre sukcesaj spertoj tradukante el la angla en Esperanton – de infanaj libroj kiel Winnie-The-Pooh, ĝis la verkoj de Ŝekspiro – li esprimas, ke:

“*Ekster mia temo ĉi-okaze, estas la problemoj de tradukado el Esperanto en la anglan. En multaj rilatoj ili estas pli grandaj ol la inversa direkto. Ekz-e, mi neniam vidis tradukojn de Esperantaj poeziaĵoj al la angla, kiuj eĉ komencis reprodukti la kompleksecon de siaj originaloj: la angla estas tro limiganta por tute libera naturo de esprimiveco en Esperanto (nobla provo estas Girvan McKay-a lerta angla traduko de Auld-a longa poemo ‘La Infana Raso’.*”¹

Poetoj elektas verki en Esperanto ne ĉar ili estas denaskaj esperantistoj, sed ĉar ili eltrovas apartajn kvalitojn en Esperanto, kiuj kaŭzas, ke ili uzu ĝin.”²

Entute Tonkin diras, ke Esperanto havas ĉian potencialon por fidela kaj ritma tradukado de poemoj kaj poeziaĵoj, sed tradukado en inversa direkto preskaŭ ne eblas pro senlima fleksebleco kaj esprimivo de Esperanto.

Kion mi volas eldiri ĉi-parenteze, estas tio, ke Rumi probable estas kaj inter la plej konataj persaj poetoj mondscale nun, kaj estas ... unu el la plej lingvo-ludemaj verkistoj en la persa literaturo. Ekz-e li mem diras pri sia lingva disordigado/ludado en poemo³:

*Rimon mi elpensantas sed diras mia amatino:
“Krom mian ekviziton, pripensadu vi nenion!”
Disordigu mi versduon, ritmon kaj rimon,
por ke parolivu kun vi for de tiu ĉi trio!*

Tamen eĉ liaj lingvoludaj esprimmanieroj estas facile tradukeblaj en Esperanton. Ankaŭ en tiu poemo li perse laŭ-litere uzis “kioas” (ĉebvyd anstataŭ ĉe bovyd). Por tiuj, kiuj volas Esperant-gramatike kontraŭstari, mi nur mencias kelkajn kunmetitajn ekzemplojn el la korelativoj jam uzatajn multfoje kvazaŭ akceptitajn, kiel: tiea, kialo, aliam, alies, ...

¹ Girvan McKay, William Auld – Master Poet of Esperanto, Tullamore, Ireland: Polyglot, 2009.

² Humphrey Tonkin, The Semantics of Invention, Translation into Esperanto, in: Humphrey Tonkin and Maria Esposito Frank (eds.), The Translator as a Mediator of Cultures, John Benjamins Publishing Company, Amsterdam/Philadelphia, 2010, 202 pp., pp. 169-190.

³ Mamduhi, Ahmad Reza, Nur la Amo: Rumi (Moŭlana) la plej Granda Mistika Poeto, Irana Esperantisto, N-ro 5, 2a jaro, Aŭtuno 2003, p. 4. (elŝutebla senpage: https://www.espero.ir/revuo/irana_esperantisto_05.pdf)



Outside my topic on this occasion are the problems of translation out of Esperanto and into English. In many ways they are greater than going in the reverse direction. I have, for example, never seen translations of Esperanto poetry into English that even begin to reproduce the complexity of their originals: English is too constricting for the free-wheeling nature of expressivity in Esperanto (a noble attempt is Girvan McKay's skilled English translation of Auld's long poem *La infana raso*: McKay 2009). Poets choose to write in Esperanto not because they are born into it but because they detect particular qualities in Esperanto that cause them to use it. These qualities are different, almost by definition, from those of

de la propagandoj kaj investadoj de Britio kaj Usono por universaligado de la angla lingvo ekde la lastaj jaroj de la Dua MondMilito:

La inspira materialo de s-ano David Curtis

Eŭropa Bulteno

Septembro 2013, No 130

Eŭropa Bulteno

Septembro 2013, Numero 130

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de septembro 2013

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Maja Tišljar, Jozefo Reinvar, Ian Fantom, Szilvási László, David Curtis, Etsuo Miyoshi, Feriöl Macip i Bonet, Bert Schumann.

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europano.eu/eo/eulropa-bulteno>



La inspira materialo de s-ano David Curtis aperis sur la paĝoj 13 & 14.

La inspira materialo de s-ano David Curtis:

“CHURCHILL KAJ LA DOMINO DE LA ANGLA
Multaj homoj ne scias, nome, ke Churchill celis domini la mondon per la angla lingvo. Tiu dominado ne okazis hazarde. Li estis ege fiero ne nur pri la brita imperio, sed ankaŭ ke lia patrino estis usonanino, kaj lia patro estis eminenta aristokrato. Li estis tre kapabla ĵurnalisto, kaj pro konstanta praktiko li fariĝis bonega aŭtoro de elstara historio de anglalingvanoj.



Winston Churchill, la iniciatinto de la tutmondigado de la angla

Ĝis la fino de la unua mondmilito, la franca lingvo dominis la mondon, sed pro usona partopreno en tiu milito, la fina traktato verkiĝis kaj en la angla kaj la franca. Tial, dum la dua mondmilito, Churchill kuraĝigis usonan partoprenon, konsilante al usonanoj ke ili, kune kun britoj, povus gajni multon, komerce kaj politike, per popularigo de la angla lingvo.


Mi estas denaska anglo, 86-jara, edukita en Anglio kaj dum mia knabeco mi lernis fieregon pri la brita imperio, sed kiam mi ekscipovis Esperanton, kiel kvardekjarulo, kaj loĝis en la domoj de eksterlandanoj, mi lernis kiom ili ofendiĝis pro la domino de mia denaska lingvo, kaj la neceso elspezi multajn jarojn en siaj lernejoj por lerni komplikaĵojn, kiujn mi sorbis kun la lakto de mia patrino.

Nun mi hontas ke homoj devas lerni mian lingvon por sukcesi en edukado, politiko kaj komerco, kaj dum

kvardek jaroj mi kampanjis en Britio por la starigo de Esperanto en britaj lernejoj, por ke estontaj generacioj konstatu ke ekzistas bonega solvo de la problemo de lingva justeco. La plimulto de la nuna generacio kredas ke eksterlandanoj preferas la anglan ĉar ĝi estas facile lernebla!” David Curtis

Lingva imperiismo laŭ Encyclopædia Britannica

Lingva imperiismo “implicas la transigon de dominanta lingvo al aliaj popoloj. La transigo estas esence demonstro de potenco - tradicie de milita potenco, sed en la nuntempa mondo ankaŭ de ekonomia potenco - kaj kutime la transigon de la lingvo akompanas transigo de aspektoj de la dominanta kulturo.” (el artikolo de Gerald Knowles en Encyclopædia Britannica).



Robert PHILLIPSON



Robert PHILLIPSON (1942-) estas brita lingvisto loĝanta en Danio. Li estis estro de la departemento pri lingvoj kaj kulturoj en la universitato de Roskilde, kaj poste fariĝis esploranta profesoro de la departemento pri la angla lingvo de Kopenhaga Komerca Altlernejo (en Kopenhago).

Li esploras kaj publikigas pri interlingvistikaj kaj anglistikaj temoj: lingvopolitiko kaj precipe lingva imperiismo, pri la rolo de la angla lingvo en la mondo kaj pri lingvoinstruado. En sia libro “Ĉu nur-angla Eŭropo?” li dediĉas kvar paĝojn al Esperanto; laŭ li Esperanto proponas funkcikapablan alternativon al la fuŝ-uzata angla.

En 1996 en Prago, en 1999 en Berlino kaj en 2007 en Jokohamo li estis partoprenanto kaj preleganto en Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj.

Je la Internacia Tago de la denaska lingvo 2010 (la 21an de februaro), la Instituto Linguapax anoncis, ke Phillipson gajnis la Linguapax-Premion kune kun Miquel Siguan i Soler.

Ĉefverkoj de Robert PHILLIPSON

Robert Phillipson: “Linguistic imperialism”, Oxford University Press, 1992 (365 pp.)

Robert Phillipson: “English-Only Europe? - Challenging Language Policy”, Unua eldono 2003 Routledge, London / New York, (256 pp.) esperantlingve “Ĉu nur-




angla Eŭropo? - Defio al lingva politiko” en traduko de István Ertl (Rotterdam : UEA, 2004) (254 pp.)

Robert Phillipson: ”Linguistic imperialism continued”, Routledge, London, 2009 (296 pp.)

Laŭ Robert PHILLIPSON

La nocio lingva imperiismo esprimas sistemecan strebadon favori respektive konservi pere de politikaj, ekonomiaj kaj/aŭ kulturaj rimedoj la dominadon de unu lingvo en interetna komunikado.



Anglalingva Imperiismo laŭ D-ro Phillipson estas: *“La domineco (de la angla lingvo), kiun pretendas kaj konservas influ-elito kaj daŭra reproduktado de strukturaj kaj kulturaj neegalecoj inter la angla kaj aliaj lingvoj”*.

Al tio ligiĝas la tezo, ke tia privilegia rolo de unu lingvo sekvigas malavantaĝojn por alilingvaj individuoj, socioj kaj kulturoj.

Lingva imperiismo estas ofte vidata kiel interrilatanta kun la kultura imperiismo. La nocio estas aplikata en kulturpolitikaj kaj lingvosciencaj diskutoj ekde la fruaj 1990-aj jaroj, kiam ĝi komencis altiri la atenton de fakuloj pri aplikata lingvistiko, interalie fare de Robert Phillipson, kiu publikigis libron sub la sama titolo en 1992. Tiu libro kondukis al multe da debato pri la meritoj kaj mankoj de la teorio. Phillipson trovis atakojn al la lingva imperiismo ekde naziaj kritikoj kontraŭ la British Council kaj sovetiaj analizoj de la angla kiel lingvo de la monda kapitalismo kaj monda dominado.

En la okuloj de kritikantoj “lingva imperiismo” estas politika slogano, kvazaŭ paralelaĵo de “kontraŭimperiismo”. Oni pridisputas interalie, ĉu la tutmonda disvastiĝo de la angla estas atribuenda al altrudo de ĝi al nedenskaj uzantoj ĉu al ĝia memvola alproprigo fare de ili.

Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al lingva politiko

„Lingva imperiismo konstruiĝas sur la supozo ke unu lingvo estas preferinda al aliaj“ (p. 162 de la libro).



El la prezento de l’angla eldonisto, en esperanta traduko, sur la lasta kovrilpaĝo:

“En ĉi tiu aktuala kaj provoka libro, Robert Phillipson pritaktas la demandon ĉu la nuntempa disvastiĝo de la angla grave minacas la ceterajn lingvojn de Eŭropo.



La libro esploras la rolon de lingvoj en la procezo de la eŭropa integriĝo. Ekzameninte la implicojn de nunaj politikoj, Phillipson pledas por lingva politiko pli aktiva, protekte al multlingva Eŭropo. Uzante ekzemplojn el landoj kun

eksplicita lingva politiko, kiel Kanado kaj Sud-Afriko, la libro detale prezentas la idearon de Phillipson pri lingva politiko inkludema por Eŭropo, kaj priskribas kiel eblas ĝin atingi.”

D-ro Phillipson pri la Brita Konsilio

Do, la Brita Konsilio estas unu el – kaj probable la plej ĉefa – institutoj fonditaj en Britio por propagandado pri kaj lernigado de la angla lingvo en la tuta mondo. Ĝin subtenas ekonomie La Brita Ministerio pri la Eksterlandaj Aferoj.

D-ro Phillipson en sia altvalora verko “Lingva Imperiismo” en parto titolita “La radikoj kaj strukturo de la Brita Konsilio” diras:

“La registara subvencio, sekve de voĉdono de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, plialtiĝis rapide de £6000 en 1935 al £386000 en 1939... Reĝa patronado baldaŭ estis venonta. Ĉe la ceremonio por oficiala inaŭgurado en 1935, la Princo de Wales esprimis: ‘La bazo de nia laboro devas esti la angla lingvo... (kaj) ni celas ion pli profundan ol nura paroliveto en nia lingvo. Nia celo estas helpi la plej multan nombron eblan (da homoj) por aprezi komplete la glorojn de nia literaturo, nia kontribuado al la artoj kaj sciencoj, kaj nia eminentega kontribuado al politika praktikado. Tio povas plej bone akiriĝi per propagando de la studado de nia lingvo eksterlande...’”³ 4

Reago de Phillipson al Churchill-a Paraolado

En 1943 Churchill ricevante honoran doktorecon de Harvard Universitato, prezentis prelegon, reage al kiu d-ro Phillipson esprimis tre malkaŝigajn klarigojn, ekz-e komence de sia reaktteksto li diras:

Churchill 1943 - 2013

Reactions by Robert Phillipson to [Winston Churchill's](#) speech when receiving an honorary doctorate at Harvard University in 1943

Churchill's first major point is support for USA global dominance. It is camouflaged as 'world responsibility'. In 1943 the British Empire was seriously weakened, British success in the Second World War was dependent on the American war machine, and the British economy was dependent on massive loans from the USA.

Secondly, Churchill sees the UK and USA as linked by 'blood and history', blood in Churchill's case being a reference to his American mother. It is factually correct that links between the two countries have been close throughout history.

Churchill sees the two nations as united by 'law, language, and literature', exemplified by morality, justice, fair play, and support for the weak. Kipling is cited with approval, but [Kipling](#) had no illusions about injustice in the USA: he 'never got over the wonder of a people who, having extirpated the aboriginals of their continent more completely than any other modern race had done, honestly believed they were a godly New England community, setting examples to brutal

“Unua ĉefa punkto de Churchill estas sebtendo por Usona monda dominado. Tio estas kamuflita kiel ‘monda respondeco’. En 1943 la brita imperio

3 White, A.J.S. 1965, The British Council: The First 25 Years, 1934-1959. London: British Council.

4 Robert Phillipson: ”Linguistic imperialism”, Oxford University Press, 1992 (365 pp.), p. 138-139.

estis serioze malfortigita, brita sukceso en la Dua Mondmilito dependis de la usona milita maŝino, kaj la brita ekonomio dependis de enormaj monpruntoj el Usono.

Usonaneco de la Churchill-a patrino

Due, Churchill vidas Brition kaj Usonon ligitaj per ‘sango kaj historio’, sango en Churchill-a kazo estas referenco al lia usona patrino....

... Churchill estis granda kredanto pri la brita imperio, kaj la rajto de Britio kaj Usono por kolonii aliajn popolojn.



La usona patrino de Churchill, Jennie Jerome en 1899, kiam li aĝis 25 jarojn

Churchill kaj UN-Sekureca Konsilio

Trie, li akcentas, ke en la milita kampanjo, usona, brita, kaj kanada fortoj havas komunan komandon. Li proponas, ke tio devas daŭri post la milito, kaj nur ĉesi kiam monda sistemo por pac-protektado stabiliĝos. La UN estis baldaŭ fondita por tiu ĉi celo, sed en formo, kiu subtenis la principon de la konstantaj membroj de la Sekureca Konsilio, inkludanta Usonon kaj Brition, por ludi decidan rolon. Tion ili ankoraŭ faras.



Churchill-a vizio pri la angla

Kvare, ŝlosila temo en Churchilla parolado estas lia esprimado de plano por la angla kiel tute dominantanta lingvo mondscale:

“Ĉi tiu donaco de komuna lingvo estas netaksebla heredaĵo, kaj ĝi povas bone iam fariĝi la fundamento de komuna civitaneco... mi ne vidas (komprenas) kial ni ne devas provi disvastigi nian komunan lingvon eĉ pli vasten tra la tuta terĝlobo kaj, sen serĉi egoistan avantaĝon super iu, posedu ni mem ĉi tiun valoregan oportunajon kaj denaskan rajton.”



Churchill similas al Rhodes

Estas multaj punktoj ene de ĉi tiuj frazoj: - Churchill-a subtenado de potenciala “komuna civitaneco” havas similecojn kun la vizio de Cecil Rhodes, kiu testamentis la tre multajn riĉaĵojn akiritajn el la orminejoj de Sudafriko por financi aktivecojn helpaj por cementi ligojn inter Usono kaj Britio. Lia heredaĵo financas la Rhodes-ajn stipendiojn, kiuj ankoraŭ estas tre aktivaj (Bill Clinton estas tipa profitanto). Rhodes-a

celo estis progresigi brita-usonan dominadon tutmonde. Li ankaŭ antaŭvidis Usonon religiĝi al Britio, ligo, kiun ĝi malfaris ekde 1776.

Usono kaj Britio reunuiĝos

Churchill antaŭvidas la du sociojn unuiĝantaj, kaj petegas pli intensajn kontaktojn por faciligi tion. En la sama spirito la politika konsultantaro de Margaret Thatcher en Vaŝingtono DC havas kiel sian celon la prosperigadon de Usona/brita dominado tutmonde.



Cecil Rhodes (1853 -1902) estis brita kolonia politikisto, post kiu ricevis sian nomon Rodezio.



Churchil-a tutmonda angla

- Churchill skizas planon por disvastigi la anglan lingvon tutmonde, tasko kiu estas projektita esti kiel “denaska rajto” de Anglalingvanoj. Ĉi tiu ridinda aserto estas malkaŝa imperialismo. Li ankaŭ asertas ke tio ne reprezentus gajni iun avantaĝon super aliaj, kion kontraŭdiras ĉiuj indikaĵoj de brita kaj usona koloniado tutmonde.

- ...

Kialo malantaŭ Brit-eliro?

- Probable unu el la ĉefaj kialoj por Britio, kiu unue ne-dezire eniris EUon, kaj nune volas eliri ĝin, estas ĝia ankoraŭa usonemo. Britoj – certe certa parto de ili – ankoraŭ sekvas kaj krede revas pri la denova unuiĝo de Usono kun Britio, kaj ĉar EU mem estas aperanta kiel nova superpotenco apud/ kontraŭ Usono, Rusio kaj Ĉinio, la britelira parto de la brita registaro preferas sian tradicion lokon ĉe Usono ol la nova ĉe EU.



Usona(-Brita) Imperio La imperia erao en la mondo ja ne finiĝis per la klasika formo de imperio, nun kompreneble regas usona imperio, aŭ ies-opinie usona-

brita imperio. Ĉiuokaze, la nova imperio estas kun tre novaj ecoj kaj emoj pripensitaj por la nuntempa erao, ekz-e:



La Usona Imperio

1- Ĝi ne nomas sin imperio - ja pro eviti malbonmemorojn de la antaŭaj nebonaj imperioj

2- Ĝi ne malkaŝas siajn imperiemajn ecojn por pli bone superregi la mondon

3- Ĝi - ne ĉiam - agas per militaj intervenoj, ĉar pli kaj pli ĝi vidas, ke fakte se ĝi povas ekspluati iun landon ekonomie, jam la fina celo de fizika konkerado kaj koloniado, t.e. utiligi la naturajn rimedojn kaj homfortojn de la konkeritoj, estas atingitaj, do kial envolvigi sian popolon kiel soldatojn, kaj poste havi problemegon sekve de ilia vundiĝo kaj mortiĝo respondante al ili/ilia parencaro.

4- Ĝi estas treege lingvisma kaj lingvokrata ĉar pleje deziras trudi siajn dezirataĵojn al la mondo (precipe konsumismon), i.a. pri vivmaniero, kulturo, pensmaniero, (tra kaj pere de sia lingvo) ...


5- Ĝi estas lingvovora: la usona angla jam formanĝis multege da lingvoj kaj en sia lando - tiujn de la tieaj unuaj loĝantoj - kaj en aliaj eĉ foraj landoj, per (kaŝa aŭ malkaŝa) oficialigo kaj (praktika) devigo de sia lingvo.

La Palgrave-a Enciklopedio de Imperialismo kaj Anti-Imperialismo

Tiu ĉi fonto entenas vere interesajn faktojn siateme.

Ĝi estas en du volumoj entute proksimume 1500 paĝojn longa. Ankaŭ ĝia strukturo interesas:

- Biografioj
- Landaj laj regionaj analizoj
- Kulturo kaj la artoj
- Historio, movadoj kaj ideologioj
- Politika ekonomio
- Temoj kaj konceptoj
- Indekso



Immanuel Ness & Zak Cope (eds.), The Palgrave Encyclopedia of Imperialism and anti-imperialism, Palgrave MacMillan, New York, 2016, 1443 pp.

Evoluigi la anglan kiel imperialisman ilon

Ekz-e ni legas en ĝi: “Angla-Usonaj lingvaj imperialistoj – eĉ se ili eble ne ĉiam konscias pri sia imperialista mensstato – kion ajn faros por propagandi la valoron de probable ties plej grava ilo por la imperia

dominado: la angla lingvo.”²⁵

48–49). Anglo-American linguistic imperialists – even if they might not always be conscious of their own imperial mindset – will do everything to spread the value of possibly its most crucial tool of imperial domination: the English language.



Du ege diversaj interpretoj pri la universaligo de la angla

1- De tiuj, kiel David Crystal kaj David Graddol, kio ne tre akcentas la rolon de la angla usona imperialismo

2- De tiuj, kiel Robert Phillipson kaj David Curtis, kio profunde akcentas la rolon de la angla usona imperialismo



Mi ja konsentas kun la dua grupo ne nur ĉar ekz-e verkistoj kiel d-ro Crystal estas tute naciemaj pro-anglaj patriotistoj, kies verkojn lukse eldonas La Brita Konsilio (pri kio mi parolos) kaj en multaj librejoj eĉ en malgrandaj urboj de Irano onin trafas iliaj libroj “donacitaj” far La Brita Konsilio, sed ĉar ankaŭ argumentoj de verkistoj kiel d-ro Phillipson estas vere konvinkaj kaj dokumentitaj – krom tio, ke iliajn verkojn eldonas neŭtralaj institucioj kiel Oxford University Press. (Oksford Universitata Eldonejo)



Usono, la savanto de la angla

David Graddol en sia libro titolita La Futuro de la Angla⁶ : “La supreniro de Usono ĝis la fino de la 19a jarcento, Britio estis fondinta la antaŭkondiĉojn por la angla kiel universal lingvo. Komunumoj de anĝla-parolantoj estis loĝigitaj ĉirkaŭ la mondo kaj, kune kun ili, modeloj de komercado kaj komunikado.

Sed la monda pozicio de la angla povus fali kune kun la imperio, kiel la lingvoj de aliaj eŭropaj koloniaj potencoj, kiel la Portugalio kaj Nederlando, se ne okazus la dramatika supreniro de Usono en la 20a jarcento kiel monda superpotenco.



5- Stefan Baumgarten, Language, Translation and Imperialism, in: Immanuel Ness & Zak Cope (eds.), The Palgrave Encyclopedia of Imperialism and anti-imperialism, Palgrave MacMillan, New York, 2016, 1443 pp., p.510.

6- David Graddol, The Future of English? A guide to forecasting the popularity of the English language in the 21st century, The British Council, United Kingdom, 1997, 65 pp.

Fakte ekzistis du aliaj eŭropaj lingvaj rivaloj, kiuj povus starigi sin kiel la monda komuna lingvo – la franca kaj la germana. Eco en sia libro – Serĉado de la Perfekta Lingvo - sugestas:

‘Se Hitlero venkus la Duan MondMiliton, kaj se Usono reduktiĝus al konfederacio de bananaj respublikoj, ni nun probable uzus la germanan kiel universalan lingvon, kaj japanaj elektronikaj vendejoj reklamus siajn produktaĵojn en sen-doganaj vendejoj de Hong Konga flughaveno.’^{7,8}

Ĉu lernado de la angla estas necesa?

Unu el miaj tre plaĉaj okazaĵoj ekde kiam mi komencis instrui nian lingvon en la Allame Tabatabai Universitato en Tehrano, estis konatiĝo kun diverslandaj instruistoj de Esperanto en universitatoj. Unu tre kara el ili estis hispana universitata instruisto pri sociologio – kiu ankaŭ instruis/as Esperanton en sia Universitato hispanie. Li afable rakontis por mi, ke kiel unu tasko por siaj sociologiaj studentoj li diris al ili, ke ĉiu studento intervjuu 100 homojn surstrate kun du grupoj de demandoj:



La unua demand-grupo:

- Ĉu laŭ vi oni bezonas /devas lerni la anglan?
- Ĉu la angla gravas por vi?

...

La dua demand-grupo:

- Kiel vi pasigas tipan tagnokton lingvo-rilate?
- Ĉu vi utiligas la anglan por io? • ...

La respondoj al la unuaj demandoj pri la graveco kaj lernendeco de la angla preskaŭ ĉiam estis pozitiva

Sed kiam ili respondis, ke kiel ili pasigis sian tipan tagnokton, ili mem eltrovis, ke preskaŭ neniam ili bezonas/utiligas la anglan!

Do, fakte plejmulto el la intervjuatoj nur pro propagandado por la angla pensis, ke la angla estas universala, oni devas lerni ĝin, sen ĝi ne eblas vivi, ...

La angla, ne parolata ĉie eĉ en Usono


Laŭ tiu ĉi vebpaĝo de “Free West Media”:

7- Umberto Eco, The Search for the Perfect Language, Blackwell, Oxford, 1995, p. 331.

8- David Graddol, The Future of English? A guide to forecasting the popularity of the English language in the 21st century, The British Council, United Kingdom, 2003, 199 pp.

“Preskaŭ kvarono de Usono parolas ne la anglan hejme

Ĉ. 13.5 elcentoj de usona loĝantaro – 44 milionoj – estas fremd-naskitaj, la plej alta nivelo ĝis nun, kaj multaj el ili ne bone scipovas la anglan...”



<https://freewestmedia.com/2018/07/25/almostquarter-of-us-speak-no-english-at-home/>

Internacia Lingvo kaj Potenco

David Crystal sub titolo “Kio estigas mondan lingvon?” skribis:

“La latina pere de la romana imperio internaciigis... ne pro tio, ke la nombro de la romanoj estis pli ol tiuj, kiujn ili subjugigis. Tre simple, ili (romanoj) estis pli potencaj... kiam la milita potenco de romanoj malpliigis, la latina ankoraŭ por unu jarmilo restis kiel la internacia lingvo de edukado, dank’ al alia speco de potenco – la potenco de la romankatolika eklezio ...

... Sen potenca bazo, ĉu politika, ĉu milita aŭ ekonomia, neniun lingvon povas atingi al la stato de internacia ilo por komunikado. Lingvo ne havas sendependan ekziston por pluvivi kiel ia magia spaco disde la popolo, kiu parolas ĝin. Lingvo ekzistas nur en la cerboj, buŝoj, oreloj, manoj kaj okuloj de siaj uzantoj. Kiam ili sukcesas sur la internacia scenejo, ilia lingvo sukcesas. Kiam ili falas, ilia lingvo falas.”⁹



Do, unuvorte Cristal kredas, ke ĉiam granda potenco devas subteni lingvon por internaciigi ĝin, potenco ĉu politika, ĉu ekonomia, ĉu milita, aŭ religia!

Tamen, ĉu eĉ nun?!

9- David Crystal, English as a Global Language, 2nd ed., Cambridge, Cambridge University Press, 2003, 212 pp., p. 7.

• Ĉu eĉ nun, en la 3a jarmilo p.K., ni civilizitaj homoj ankoraŭ devas militi por starigi indan internacian lingvon - kiel Esperanton - en ĝian ĝustan kaj justan lokon?

• Ĉu nun esperantistoj nur devas estigi armeon por milite ekokupi landojn por Esperant-lingvigi ties loĝantarojn?

• Ĉu ankoraŭ logiko, homamo, paco kaj saĝo ne povas taksigi kiel potenco?

• Kaj fine, ĉu ankoraŭ la ĝangala leĝo ...?!

La angla lingvo: elitista!

Pro sia malfacileco kaj komplekseco, la angla lingvo ne povas lerniĝi facile per ĉiuj, sed nur tre malfacile per tre malmultaj homoj, kiuj fakte iel estas elito! Ili:



• aŭ disponas pri multa mono kaj komforto por dediĉi tiom multe da mono kaj tempo al la lernado de la angla.

• aŭ estas tiel inteligentaj por pli facile kaj pli rapide mastri la lingvon

• aŭ ĝuas bonrilatojn kun potenculoj kaj facile povas utiligi rimedojn lerno-cele ĉu enlande aŭ ekster-lande "sur la loko"!

La angla: kriblilo por facile selekti plej bonajn cerbojn el la aliaj landoj!

Do, la angla lingvo pere de sia malfacileco fakte funkcias ankaŭ kiel kriblilo por selektado de la elitanoj el inter la tuta loĝantaro de ĉiu lando por la anglalingvaj imperialistaj landoj.



Kion faras la angla kiel imperialista lingvo?



Nun la oreloj pretas por ensorbi ĉion en la angla

Post tia aŭ tia ellernado – kaj eĉ lernado – de la angla, multaj oreloj pretas funkcii kiel enigilo de informoj kaj induktoj en la cerbojn de la lernintoj de la angla lingvo.



Eskapado, aŭ ŝtelado de la cerboj?!

